



# KVINPETALO (SYM) NOVAĴLETERO

Nova jaro, 2023



*Grava perdo por ni estis la forpaso de Claude Nourmont*

## MALFACILAJ JAROJ PASIS

Ekde 2020, ĉiuj asocioj suferis pro la pandemio, malmultaj aŭ neniu vojaĝis plu. Ankaŭ niaj planitaj staĝoj ricevis nur kelkajn fidelulojn.



Tamen, dank'al tiuj kaj aliaj amikoj, nia centro daŭre vivas.

Kial? Tial ke ili subtenis Kvinpetalon per donacoj, malgrandaj kaj ankaŭ grandaj.



Estis speciala alvoko por **refaro de unu el la tegmentoj**. Sed feliĉe ni ankaŭ ricevis donacojn sen speciala celo, kaj tio helpis pagi la kostojn kiuj plu estis eĉ sen aktivado.

**Ni kore dankadas al ĉiuj donacintoj, ĉar ili permesis ke la estonteco de la centro restas malfermita.**

Dum preskaŭ du jaroj loĝis en la centro Claudette Triqueneaux kiu kunlaboris volontule en prizorgado de la domoj. Pluraj laboris por farbado de la ŝtroj kaj pordoj. La biblioteko estis prizorgata kaj ordigata. Por tio estis aĉetitaj novaj bretaroj.

## ALIAJ JAROJ VENAS





Ekde nun, ni bezonas ĉiujn niajn membrojn (kaj novajn) por organizi kaj plenumi staĝojn en Bouresse. Ni bezonas daŭre donacojn ĉar aliaj tegmentoj atendas renovigon, fenestroj kaj pordoj atendas farbadon, la domoj esperas prizorgadon, la Esperanta kulturo atendas pristudon kaj disvastiĝon, la Esperantista etoso atendas denovan efektivigiĝon.

Verdire, sen vi, niaj membroj kaj subtenantoj, nia asocio "Société Yvonne Martinot" ne plu kapablos vivi kaj viviĝi nian kulturon.



Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse. <http://kvinpetalo.org> Ĉekoj al Société Yvonne Martinot  
Société Yvonne Martinot, IBAN : FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795, BIC : PSSTFRPLIM

## Por vi kaj por aliaj jen la jam anoncataj staĝoj en Kvinpetalo en 2023

<b>Februaro 20a-24a</b>	<p><b>Staĝo pri tradukado</b>          Por iuj tradukado estas ĝena neceso en plurlingva medio, por aliaj ĝi estas ŝatata lingva ludo. Ni ĉiuj devas pli-malpli ofte traduki. Sed bona regado de lingvoj kaj bona kapablo traduki ne ĉiam kuniras : por bone traduki ne sufiĉas regi la koncernatajn lingvojn, necesas ankaŭ kono pri la priskribitaj aferoj kaj antaŭ ĉio ekzercado.          Ĝuste ekzercadon ni proponas en tiu ĉi staĝo, dum kiu ni okupiĝos ne pri teorio sed pri praktiko, kun tekstoj de diversaj specoj (ekzemple literaturo, gazetaraj informoj, vikipediaj artikoloj, turismaj informoj). La celo estas ne nur produkti bonajn tradukojn, sed ankaŭ plibonigi la lingvan nivelon en Esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj.          Partoprenantoj de diversaj lingvoniveletoj estos do bonvenaj. La kurso taŭgos ankaŭ por prepariĝi al la traduka parto de la ekzameno pri supera lernado de Franca Esperanto-Instituto          Temos esence pri tradukado el la franca al Esperanto, sed partoprenantoj kun aliaj gepatraj lingvoj estos bonvenaj, ĉar oni povos labori interalie pri tekstoj jam ekzistantaj en pli ol unu lingvo.</p>	<p><b>Brian Moon</b></p> 
<b>Februaro 20a-24a</b>	<p><b>Praktikado de la lingvo plurnivela</b>          La kurso koncernas komencintojn kaj progresantojn... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso.          Catherine Kremer, profesia ĉiĉeronino, zorgos pri la paroliga kurso : La de ŝi plej ŝatata temo por paroligi homojn estas "turismo".          Venu kaj kunportu anekdotojn aŭ legendojn rilate vian regionon. Aldone, se vi posedas malnovajn dokumentojn rilate viajn praulojn, familianojn, ekz. fotojn, ne hezitu kunporti ilin por libere prezenti diversajn temojn al la grupo.          (Aliaj detaloj sekvos)</p>	<p><b>Catherine Kremer</b></p> 
<b>Aprilo (datoj ankoraŭ ne fiksitaj)</b>	<p><b>Praktika staĝo pri ekologia ĝardenumado</b>          Aŭtune la unua paŝo por pripensi ekologian mastrumadon de ĝardeno estas konservi vivanta la grundon.          De jam pluraj jaroj en Kvinpetalo oni amasigas la organikajn defalaĵojn (legomrestaĵojn, branĉetojn, eltonditan razenon...) kaj nun necesus fabriki simplan kribrilon por disigi la utilan kompoŝton disde la tro dikaj lignopecoj.          Oni ankaŭ lernos la uzadon de la specialaj iloj por prepari respektive la grundon sen plugado.</p>	<p><b>Bernard Lagrange</b></p> 
<b>Aprilo (datoj ankoraŭ ne fiksitaj)</b>	<p><b>Praktikado de la lingvo plurnivela</b>          La kurso koncernas komencintojn kaj progresantojn... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso.          (vidu supre)</p>	<p><b>Catherine Kremer</b></p>
<b>Junio 19a-23a</b>	<p><b>Promenado tra naturo kaj Vikipedio</b>          Ĉiutage, matene aŭ posttagmeze laŭ la vetero, ni vizitos naturan medion - arbaron, herbejon, vojrandon, lag- aŭ riverbordon... kaj malkovros ĉefe plantojn, eble fungojn. Kaj interne de Kvinpetalo, ni determinos, iom studos pri botaniko kaj riĉigos Vikipedion per informoj ligitaj al la renkontitaj estuloj.          Ja unuavide ambicia programo, sed ne timu : ĝi estas alirebla por ĉiuj, kaj la celo pliampleksigi Vikipedion ege gravas por la disvolvo de nia esperanta komunumo.          Ne forgesu vian komputilon, promensuojn, eventuale determinlibrojn (eĉ bazajn) kaj lupeon.          Tiu staĝo taŭgos ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo "Sciencoj kaj Tekniko" de la <b>Atesto pri Kapableco</b> de FEI.</p>	<p><b>Alain Favre</b></p> 
<b>Junio 19a-23a</b>	<p><b>Praktikado de la lingvo plurnivela</b>          La kurso koncernas komencintojn kaj progresantojn... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso.          (vidu supre)</p>	<p><b>Catherine Kremer</b></p>

Baldaŭ anonciĝos ankaŭ aliaj staĝoj. Kontrolu ĉe la retpaĝaro <http://kvinpetalo.org>